


ISSN 0023-3692

# KONTAKTO

numero 217 (2007:I)

## Bonvenon al Vjetnamio: lando de IJK 2007

Mitoj





Saluton!

Estas ĉiam mia ĝojo, plezuro kaj honoro saluti vin, karaj legantoj kaj aŭtoroj, en la unua numero de la jaro! Dankon pro via membrigo aŭ abono – aŭ re-membrigo kaj re-abono – kaj viaj ĉiam bezonataj kontribuoj!

Tiu ĉi numero ne havas fortan ĉefan temon – vi trovos artikolojn pri diversaj temoj: ekzemple, ligite al la temo “Mitoj”, atendas vin informoj pri la misterreligio,

kiu havis la ŝancon fariĝi unu el la ĉefaj religioj de la mondo. Vi trovas ankaŭ originalan prozon el Niĝerio, Kazaĥio kaj Ukrainio, vojaĝajn rakontojn el Urugvajo, Vjetnamio kaj Benino, la komikson pri Rat-Man, recenzon, enigmon kaj “bumerangojn” al la antaŭaj artikoloj. Krome, atendas vin nova rubriko – “Anguleto” (p. 15).

Malfacilas kredi, sed baldaŭ estos jam du jaroj, ekde kiam mi loĝas en Usono. Dum tiu ĉi tempo mi edzinigis, multe plibonigis mian anglan, vizitis kelkajn urbojn kaj nekalkuleblajn interesajn lokojn, konatiĝis kun multaj usonaj samideanoj (kelkaj el kiuj eĉ kontribuis al *KONTAKTO!*), trovis laboron en la Usona Ruĝa Kruco kaj eĉ sukcesis baldaŭ promociiĝi al la posteno de sekciestro. Kaj nun antaŭ mi staras iom malfacila tasko: konvinki la estrojn de la organizo pri la neceso de alternativa transporto al la malfacile atingebla loko, kien translokiĝas mia laborejo.

Eble por vi tio estos malkovro, sed la publika transporto funkcias malbone en la plej riĉa (supozeble) lando de la mondo pro diversaj, ĉefe, politikaj, kialoj. La granda plejmulto de la usonanoj posedas aŭtojn, kaj la plejparto de la “senaŭtuloj” revas finfine havi ilin kaj aĉetas je la unua okazo. Ĉi tie mi ne parolos pri la konsekvencoj de tio ĉi – ili ja estas konataj... Komprenoble, iuj homoj (kiel ni) intence elektas senaŭtan vivstilon, sed ili estas vere manpleneto. Do, kampanjante pri la alternativa transporto en mia laborejo, venis al mi la ideo dividi la spertojn pri aktivado en diversaj sferoj – ĉu ekologia, homrajta, lingvorajta aŭ iu alia – ja ni esperantistoj ofte aktivus en plej diversaj sociaj sferoj. Mi nepre skribos pri la sukcesoj (aŭ malsukcesoj) de tiu ĉi mia iniciato, kaj mi elkore invitas vin kontribui per artikoloj pri viaj spertoj kaj viaj kampanjoj – ĉu sukcesaj aŭ malsukcesaj. Tiel ni povu lerni unu de la alia – kaj kunlabori! Ni publikigos viajn artikolojn en diversaj numeroj tra la jaro aŭ eble eĉ faros specialan numeron “Kune – por pli bona mondo”.

Ni tre atendas (kaj antaŭĝuas) ĉiujn viajn kontribuojn – ĉu pri la anonc-taj temoj aŭ ne, ja ĉiuj kontribuoj estas bezonataj! Agrablan legadon!

*Ĝenja*

## <ENHAVO>

“Se iu plago estus bremsinta la disvastiĝon de la kristanismo, la mondo fariĝus mitraisma” (Olivier Gaudefroy, Francio; Elena Plisko, Ukrainio/Rusio) .....3-4

Zam, kreinto de Esperanto (Christian Lavarenne, Francio).....4

La Verda Mondo (Olúbunmi Gabriel Ōshó-Davies, Niĝerio) .....5

Ŝlosita seruro (Maksim Petrov, Kazaĥio) .....6-7

Ŝi (Maksim Petrov, Kazaĥio) .....7

Ekkonu Urugvajon! (Daniel Richard Bebelacqua Acosta, Urugvajo).....8-11

Por ŝatantoj de sudoko (Dmitrij Cibulevskij, Ukrainio).....11

Bonvenigaj ridetoj: invito al Vjetnamio – la lando de la 63a IJK (Hong Hac, Vjetnamio) .....12

La ŝanĝo kiu (ne) gravas (Olúbunmi Gabriel Ōshó-Davies, Niĝerio) .....12

Brila juvelo en iom modesta muntaĵo (Paŭlo Moĵajev, Ukrainio) .....13

Bumerange: Jam alia esperantiĝinta Ekotopio (Christian Lavarenne, Francio).....13

Bumerange: Metafanismo? (Wendel Teles Pontes, Brazilo) .....13

Rat-Man: mitoj kaj veroj pri la musa itala super-antiheroo .....14

Anonce.....14

Angulego: Magia altiro (Aneta Ubik, Germanio).....15

Gratule, informe.....15

La festa etoso en Benino (François Hounsounou, Benino).....16

Fotoj sur la kovrilo: kompleze de Hai Ly LAI THI. Supre: golfo Halong, (maldekstre): Granda Teatro, (dekstre): Templo de Literaturo.

### Kiel sendi kontribuojn al *KONTAKTO*?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ *KONTAKTO* ne estas movada revuo, do *ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!*
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTEF (bv. uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! **Koran antaŭdankon!**

### Temoj de *KONTAKTO* en 2007

2007:2. LIBERO.

2007:3. PARANORMALAĴOJ/MISTEROJ DE LA MONDO

(1-a de majo, 2007). La homaro dum sia tuta historio provas trovi respondojn al la misteroj de la vivo kaj postmorta vivo, la naturo, la universo... Ni serĉas Atlantidon kaj provas trovi la respondojn al multaj demandoj de la homa ekzisto. Skribu al *KONTAKTO* pri la misteroj de la mondo, kiuj aparte interesas vin!

2007:4. (eble) “KUNE – POR PLI BONA MONDO”.

La temoj de la sekvaj numeroj ankoraŭ ne estas deciditaj. Proponu vian temon! Ĉiuj viaj artikoloj, ideoj, konsiloj, rimarkoj estas pli ol bonvenegaj kaj tre bezonataj! Kontaktu la redakcion laŭ la adreso: *KONTAKTO*, 16800 Phillips Rd. Alpharetta, GA 30004 Usono; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>.

**KONTAKTO:** Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro 217** (2007:1), 44-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo:** <http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:** ☐ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** *KONTAKTO*, 16800 Phillips Rd. Alpharetta, GA 30004 Usono; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. **Redaktoro, grafikisto:** Eugenia AMIS (Ukrainio/Usono). **Vic-redaktoroj:** Joel AMIS (Usono) kaj Paŭlo MOĴAJEV (Ukrainio). **Ĉefkorektisto:** Paŭlo MOĴAJEV (Ukrainio). **Presado:** Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudefroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko, (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). **Facilingvaj artikoloj** estas verkitaj en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas kun la unua numero ĉiujare. **Anoncarifto:** Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaj 50% da rabato. **Varbantoj** de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30 %. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **anoncetoj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifto:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi völegigitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radio:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): *Radio Havano (Kubo)* Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio/ 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22:00/21/13 715; <http://216.138.240.229/rc4> (je la 15a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es\_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). *Pola Radio:* elsendoj:13:30/41,23/7 275; ripetoj: 18:00/42,07/7 130; 20:00 kaj 9:30 sekvan tagon (nur per satelito). La satelita ricevo eblas per: Eutelsat II F – 6 – Hot Bird – 13 gradoj de la orienta latitudo; frekvenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz. <http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>, <http://www.radio.com.pl/polinia/esperanto\_ao.asp>, <http://start.at/retradio>

**La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

# “Se iu plago estus bremsinta la disvastigon de la kristanismo, la mondo fariĝus mitraisma”

Olivier Gaudefroy, Francio;  
Elena Plisko, Ukrainio/Rusio

La unuaj skribaj mencioj pri la veda dio Mitrao estas datitaj de 1400 a.K. La adorado de Mitrao disvastiĝis de Hindio al Persio, kaj post la venko de Persio fare de Aleksandro la Granda, la Mitraa kulto disvastiĝis al la tuta helena, kaj poste – al la romia mondo. Konata kiel “Mitras” en la Romia Imperio, li reprezentis lojalecon al la imperiestro. Restaĵojn de mitraaj sanktejoj (“mitraejoj”) oni trovas en pluraj landoj de Eŭropo kaj Azio – ekzemple, baziliko de Sankta Klemento en Romo, apud Koloseo, estas konstruita sur la loko de antikva mitraejoj.

## La devenoj

En la hindeŭropa pralingvo, la vorto “mitrao” signifas “interligo”, “kontrakto”, “ĵuro” – aŭ “amiko”. Mitrao estis bonvola dio, protektanto de la justeco kaj prizorganto de la ordo en la mondo, kaj samtempe li estis ankaŭ la dio de ĵuro kaj de alianco. Laŭ legendo, Mitrao naskiĝis de virgulino en groto la 25-an de decembro kaj estis peranto inter Ahura Mazda, la ĉefdio de la antikva Persio, kaj la homaro. Li promesis senmortecon de la animo kaj estis konsiderata ankaŭ kiel resaniganto kaj saĝulo – oni nomis lin “la bona paŝtisto”, “la Mesio” kaj “la savinto”. Lia sankta tago estis dimanĉo kaj li praktikis kun siaj disĉiploj ritojn de bapto kaj de komunio per pano kaj vino.

Malgraŭ la religia reformo de Zoroastro en la sesa jarcento a.K., kiu deklaris ekziston de la sola dio – Ahura Mazda, kiu oponis al la malbona spirito – Mitrao tamen restis la dio de multaj homoj, ĉefe ŝafistoj kaj militistoj. Laŭ zoroastrismo, Mitrao estis kreaĵo de Ahura Mazda, kvankam en la persa kulturo Mitrao fariĝis kvazaŭ enkarniĝo de Ahura Mazda, kiu rolis kiel “Juĝisto de la Animoj” – la premianto de la bonaj kaj



Mitrao: duflanka reliefo (Romio, 2-3 j.c. p.K., Luvro, Francio)

neniiganto de la malbonaj. Mitrao estis ĉioscia, netrompebla kaj senerara, ĉio-observanta kaj neniam ripozanta.

Kiam la persaj kredoj enmigris la Sudan Eŭropon (plej verŝajne, importitaj fare de la soldatoj dum la militoj en la Oriento), ili facile asimiliĝis. Ekzemple, post la konkero de Persio fare de Aleksandro la Granda en la tria jarcento a.K., Mitrao asimiliĝis al Apolono. Poste, sub la romianoj, Mitrao fariĝis bazo de granda mister-skolo – tiun trajton la kulto de Mitrao ne havis dekomence. Ne eblas diri precizan daton, kiam aperis la mitraa mister-skolo. Laŭ Plutarĥo, tio okazis en la unua jarcento a.K., sed ekde la unua jarcento p.K. mitraismo havis pli kaj pli gravan influon en Romio. Mitraismo atingis apogeon de populareco en la 3-4-a jarcentoj p.K., kaj ĝi estis plej populara inter la soldatoj kaj nobeloj de la Romia Imperio. La kulto estis precipe urba, kaj ankaŭ socie ĝi havis rimarkindan trajton: malgraŭ tio, ke la persa dio Mitrao dekomence prezentis kaj virajn kaj inajn principojn, virinoj ne estis akceptataj en tiun ĉi misterskolon.

Post la akcepto de kristanismo fare de imperiestro Konstanteno la Granda en la frua 4-a jarcento, mitraismo rapide malkreskis, kaj ĝi tute malaperis post la dekreto de imperiestro Teodozio la Unua en 391, kiu malpermesis ĉiujn “paganajn ritojn”.

## Praktikoj

Niaj scioj pri mitraismo estas bazitaj precipe sur la trovitaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj, ĉar preskaŭ neniuj sanktaj tekstoj alvenis al ni, kaj ĉiuj ritoj estis sekretaj, kaj rivelitaj nur al malmultaj inicitoj.

La religiaj praktikoj okazis en mitraejoj – speciale adaptitaj naturaj kavernoj aŭ artefaritaj konstruaĵoj, imitantaj kavernon. Mitraejoj estis malhelaj kaj senfenestraj, eĉ kiam la konstruaĵo ne estis sub la tero. La konstruaĵoj konsistis el vestiblo (la “kaverno”), kun benkoj ĉe la muroj por la rita komuna manĝado, kaj la sanktejo ĉe la fino, kun la altaro (estas notinde, ke la mitraejoj ne estis grandaj: ili estis faritaj por 30-40 viroj). Oni trovas restaĵojn de multaj mitraaj sanktejoj en ĉiuj lokoj, kiuj konsistigis la Romian Imperion. Iuj mitraejoj estis transformitaj en la kristanajn kriptojn. En ĉiuj mitraaj temploj la honoran lokon okupas la bildo de Mitrao mortiganta la sanktan bovon asociitan kun printempo. En tiuj bildoj Mitrao portas frigian ĉapon kaj orientan pantalonon kaj rigardas aliloken. Sur la bildo aperas ankaŭ serpento, hundo, skorpio, korvo, pokalo kaj leono. Super Mitrao estas simboloj de la suno kaj la luno sur la stelplena ĉielo.

Laŭ la mita kredo, Mitrao estis la dio aperinta por lukti kontraŭ la malbono kaj por protekti la mondon kontraŭ la

sekeco, do, iusence li estis agrikultura dio. Li estas la venko de la lumo en tenebroj. Do multaj reprezentaĵoj de Mitrao, kiu buĉoferas la taŭron, reprezentas la savon de la mondo. La buĉofero donas al la mondo la necesan vivo-forton. En la greko-romia mito, de la korpo de la mortanta taŭro kreskas plantoj kaj bestoj. Kontraste en la persa mito, *Ma* (la luno) savas la esencon de la mortanta taŭro, kaj ĝi donas la vivon al ĉiuj bestaj kreaĵoj.

Aliflanke, tiu sceno estas ankaŭ profunde kosmologia: David Ulansey en *Scientific American* (1989:6) proponis astrologian klarigon: bovo reprezentas la konstelacion Taŭro, Mitrao – la konstelacion Perseo, kaj ĉiuj aliaj figuroj prezentas aliajn konstelaciojn: Hidro (serpento), Granda (aŭ Malgranda) Hundo, Korvo, Leono kaj Pokalo. Laŭ multaj esploristoj, la mitraejoj estis faritaj kiel “modelo de la universo”. Mitraa esoterismo ŝajne radikas en la neoplatona ideo, ke la moviĝo de la suno de unu solstico al la alia paralelas al la moviĝo de la animo de unu universo al la alia, de antaŭekzisto – en la homan korpon – kaj tiam en la sekvan vivon.

## La mitraismo: religio de la misteroj

De Oriento al Okcidento, mitraismo fariĝis, same kiel multaj aliaj kredoj, religio de misterskoloj. Dum sia inicado,



Mitrao mortiganta la taŭron (Romio, 3-a j.c. p.K., arkeologia muzeo en Palermo)

la neofito devis pasi de mallumo al la lumo, do morti simbole por renaskiĝi en la nova vivo. La inicaj ritoj postulis kuraĝon kaj persistemon – eble ĝuste tio klarigas popularecon de mitraismo inter la militistoj. La inicitoj estis konsekraj per siaspeca bapto kaj markataj per ruĝa fero.

Inicado en la ritojn de Mitrao, same kiel inicado en multajn aliajn antikvajn filozofiajn skolojn, konsistis el tri gravaj gradoj, preparado al kiuj konsistis el sinpurigado, kreskigo de intelektaj kapabloj kaj rego de sia besta naturo. La inicitoj estis dividitaj en sep gradojn laŭ la hierarkio, verŝajne, ligitaj al la sep planedoj. Oni atendis, ke

ĉiuj membroj progresos de la unua al la kvara grado, sed nur manpleno povis supreniĝi al la tri plej altaj gradoj. La mitraa komunumo estis estrata de la Patro, kiu portis ringon kaj bastonon, same kiel katolikaj episkopoj. Pro la manko de historiaj rakontoj kaj ĝenerala sekreteco en misterskoloj, ni ne povas esti certaj pri tio, kio estis rivelata al la inicitoj, sed oni scias, ke en la mitraejoj oni okazigis simbolajn komunajn manĝadojn kaj okazigis festojn de senmorteco.

### Influo sur kristanismo?

Mitraismo havis konsiderindan influon sur militistojn kaj nobelojn de Romio tiel ke ĝi

preskaŭ fariĝis oficiala religio de la Imperio, kiam la imperatoro Aŭreliano (ĉ. 214-275) volis reunuigi la religian konscion ĉirkaŭ la sola sundio, la ĉefa dio de la romia panteono. Aŭreliano ne persekutis aliajn religiojn kaj kredojn, sed li ŝajne sekvis la principon: “unu dio, unu imperio”. Li volis doni al ĉiuj homoj de la Imperio – ĉu civiluloj aŭ soldatoj – kredon je la sola dio, sen perfidi iliajn proprajn diojn.

Ĝuste tiurilate franca filozofo kaj historiisto Ernest Renan (1823-1892) diris: “Se iu plago estus bremsinta la disvastiĝon de la kristanismo, la mondo fariĝus mitraisma”. Kristanismo anstataŭis mitraismon, sed ties influo sur kristanisman estas tre granda. Ekde la jaro 600 a.K., persa klerikaro de Mitrao celebris la diservon per vino kaj pano. “Tiu, kiu manĝas mian karnon kaj glutas mian sangon, loĝas en mi kaj mi loĝas en li”, diras mitraisma maksimumo, kiu similas al tiu de eŭkaristio. Same kiel Kristo, Mitrao naskiĝis la 25-an de decembro, la tago de la renaskiĝanta suno en antikveco. Krome, la adeptoj festis ankaŭ la Renaskiĝon proksime al la tempo, kiam oni nuntempe festas Paskon, praktikis ritojn de bapto kaj komunio kaj kredis je lasta juĝado kaj resurekto. Jen kiel resumas *Encyclopaedia Britannica* la similecojn inter kristanismo kaj mitraismo:

“La frateca kaj demokratia spirito de la unuaj komunumoj, iliaj humila origino; la identiĝo de la objekto de la adorado kun la lumo kaj la suno; la legendoj pri la ŝafistoj kaj iliaj donacoj kaj la adorado, la inundo kaj la fajra ĉaro en la arto, la elpremo de la akvo de la roko; la uzado de sonoriloj kaj kandeloj, la sankta akvo kaj la komunio, la sanktigado de dimanĉo kaj de la 25-a de decembro; la insistado pri morala konduto, la emfazo de abstino kaj sinregado, la doktrino pri la paradizo kaj la infero, la primitiva revelacio, la perado de la Vorto – *Logos* – elradiata de la sankteco, la pekliberiga ofero, la ĉiama batalo inter la bono kaj la malbono kaj la fina venko de la unua, la senmorteco de la animo, la lasta juĝo, la resurekto kaj la rekonstruo de la universo – tio ĉi estas nur kelkaj similaĵoj...”

Tamen, malgraŭ ĉiuj similaĵoj, estas ankaŭ profunda malsimilaĵo: se Mitrao substrekis militajn kaj virecajn valorojn, Kristo substrekis neperforton kaj kompaton. La kialo por preni simbolojn de la plej influa religio de la Romia Imperio eble estis ke, uzante tiujn ĉi simbolojn, la nova religio povus pli bone reliefigi en la konscio de la homaro.

## Zam, kreinto de Esperanto

Christian Lavarenne, Francio

UEA kaj multaj esperantistoj propagandas, kaj eble eĉ daŭre kredas, ke Esperanton kreis Zamenhof. Sed mi malkovris en la Biblioteko Hector Hodler, do en la Centra Oficejo mem en Roterdamo, malnovan dokumenton, kiu klare pravas, ke temas pri sufiĉe nova mito, nur de la 19-a aŭ 20-a jarcento. Jen la senŝanĝe reproduktita eltiraĵo el la fino de la atesto, en 1911, de la usona samideano Henry H. Barroll:

“La lingvo marsa!”, – mi ekkriis, – “do oni parolas tiun ĉi lingvon sur Marso?”

“Certe, kaj ankaŭ sur Venuso. Sed kial tio surprizas vin? Vi ankaŭ parolas la marsan lingvon.”

“Jen kial!”, – mi diris, mirigita, – “ĉar ĝi estas nia internacia lingvo, elpensita de Doktoro Zamenhof.”

“Elpensita de Doktoro Zamenhof”, – li ripetis, dum rideto aperis tra lia larĝa vizaĝo. – “Aŭskultu! La marsa kaj venusa lingvo, kiun vi ĵus interparolis kun mi, jam ekzistas neŝanĝita de antaŭ dudek milionoj da jaroj. Via Doktoro Zamenhof supozas, eble, ke li ĝin elpensis, tio nur atestas, ke li bone elfaris lingvon, kiu estis jam adoptita antaŭ milionoj da jaroj kiel la sola perfekta lingvo.”

Lia trankvila, sed tute ĝentila maniero min silentigis. Li sidiĝis sur la seĝon de la maŝino (...) kaj, tuŝinte ian puŝbutonon, li rapide supreniris kun la maŝino, kiu baldaŭ estis ne plu videbla sur la blua ĉielo.

P.S. Mi nenion elpensis, sed nur kopiis el la 31-paĝa libreto *Rakonto kaj aventuro*, eldonita en Vaŝingtono de *American Esperantist Co.* La titolo de la novelo mem, ĉarma, sed iom malnoveca, estas “La Aviadisto de Marso”, kaj eble temas pri la unua scienc-fikciaĵo en Esperanto. Mi nenion trovis en Esperanto pri la aŭtoro. Laŭ la interreto, li tiam estis 60-jara, kaj li ankaŭ verkis *Dibrell Genealogy* (Genealogio de Dibrell) en 1915. Li verŝajne estis sufiĉe fama homo, ĉar estas almenaŭ 375 gazetartikoloj pri li (aŭ lia edzino), interalie, en *The Washington Post*, 12-3-1910. Se iu scias pli pri li kaj lia esperantisteco, li bonvolu sendi la informojn al la listo [ehist@yahoo.com](mailto:ehist@yahoo.com) (antaŭdankon).

\* Christian Lavarenne estas esploristo pri E-historio.

# La Verda Mondo

Facila

Olùbìnmì Gabriel Òshó-Davies, Nìgerio

Mi estas maljunulino. Mia nepo, kiu venis hejmen por ferioj, kiuj daŭros unu semajnon, decidis viziti kun mi la faman Verdan Mondon. Mi devas diri ion, eble iom malĝentilan: se vi ankoraŭ ne aŭdis pri la Verda Mondo, mi opinias, ke vi ne estas moderna. Eĉ en miaj lastaj sur-teraj monatoj mi scias pri ĝi. Vizito al tiu fama loko eble estas la lasta plej grava afero en la lastaj kelkaj tagoj aŭ monatoj de mia vivo. Mi jam multe aŭdis pri ĝi, kaj ŝajnas ke mia vivo estus sen-signifa, se mi ne vizitus ĝin antaŭ la morto.

Antaŭ unu semajno mia nepo jam aĉetis miajn biletojn, kaj pro tio ke ankoraŭ ne komenciĝis la sezono de aktiva ekskursado (ĉar ĉi-tempe nur studentoj havis mallongajn feriojn) ne estis tro malfacile eniri la Verdan Mondon. Ĉe la enirejo granda tabulo anoncas: "Helpu kulturilo la Verdan Mondon!"

Vere ĝi estas verda mondo. Mi neniam vidis ion similan dum miaj sur-teraj vojaĝoj. Ĉi tie troviĝas arboj, kies grandeco kaj aspekto montras, ke ili estas kelkcent-jaraj. Troviĝas ĉiaj floroj, eĉ tiuj, kiuj nature ne kreskas en nia parto de la mondo. Ni vidis ankaŭ bestojn, eĉ tiujn, pri kiuj ni nur legis en libroj, tiujn, kiujn ne vidis kelkaj antaŭaj generacioj. Ni vidis hundojn kaj katojn, tiujn amikojn de homoj. Ni vidis **elefantojn** kaj **leonojn**, pri kiuj neniu el mia generacio kredis, ke ili vere ekzistis. Kiel oni sukcesis re-viv-igi tiujn mal-aper-intajn bestojn – mi tute ne scias, sed mi tut-kore **laŭdas** la registaron pro la sukceso ŝanĝi la naturon kaj re-aper-igi la bestojn.

Dum mi rigardas al ili, mia nepo montras alian pord-egon kun anonco, ke oni ne en-iru, krom se pro specialaj kialoj. Kio estas speciala kialo? La nepo demandis min, ĉu mi scias ion pri la loko. Mi respondis, ke mi tute ne scias, pri kio temas. Li petas min ek-sidi kaj for-iras por ek-scii ĉion pri la loko!

Mi ne povas tro longe sidi. Mi aĉetis la bileton ne por veni kaj sidi. Mi ek-staras kaj al-proksim-iĝas al iu fiŝ-lag-eto. Same kiel ĉe aliaj lokoj en la Verda Mondo oni metis anoncon, kiu petas, ke oni ne kaptu fiŝojn. "Vere, la fiŝoj estas speciale **dresitaj**", – mi diras al mi post mal-longa pri-studo de la akvaj bestoj. La plej amuza afero estas la ritmo, laŭ kiu ili naĝas. Mi ne certas, ĉu mi faris korektan kalkulon, sed ŝajnas al mi, ke la daŭro, dum kiu ili naĝas mal-supren kaj supren, estas ĉiam egala. Ĉiu fiŝo ŝajne ricevis specialan taskon moviĝi laŭ sia propra maniero, kiun la aliaj ne ripetis.

Re-ven-inte al la loko, kie sidas mia nepo, atendante min, mi demandas lin: "Kial oni nomas tion la Verda Mondo, kvankam tio estas nur ĝardeno? Nu, nepo, ne mis-komprenu min, mi ne mal-estimas ĝin. Ĝi estas bonega loko. Kaj mi pensas ke la loko, kiun ni ne povas en-iri, estas eĉ pli bona. Ĉu ne?" Mia nepo ame al-premas mian kapon al si kaj ek-parolas:

"Pardonu avinjo, se vi estos sen-**rev-ig-ita**..."

"Ne, tute ne!", – mi levas mian kapon. "Mi ne estos sen-**rev-ig-ita**. Ĝi estas bonega projekto kaj per miaj lastaj spiroj mi preĝas por ĝia sukceso. Nu, diru al mi ĉion pri la alia loko, kiun oni ne rajtas eniri!"

Nu, mi ŝajne ne bezonas respondon de mia nepo. Gvidata de iu ne-esprim-ebla **instinkto** mi de-nove promenas preter la bestoj kaj vidas ĉion. Mi vidas ion, kion mi ne vidis antaŭe.

Ho, mi jam estas tro maljuna por tia sperto. Mi ne povas el-teni tion. Dum mi re-venas al mia nepo, mi ne povas ne krei plure: "Via mondo estas malfeliĉa, mia kara. Vi scias tion, sed vi ne konsentas. Mi rimarkis ĉion: arte-faritan kant-adon de la birdoj, la mekanikajn movojn de la okuloj kaj piedoj de la bestoj. Jes, nepo, mi vidis ĉion. *Vi* havis la teron, sed *vi detruis* ĝin. *Vi* nun kulturilo **plastan** mondon, la mondon el **kaŭĉuko**!"

"Ĉu vi nun kulp-igas min pri ĉio?" – mia nepo demandas, iom kolere.

"Ne vin persone. Ĉio komenc-iĝ-is jam generaciojn antaŭ mia nask-iĝo. Sed ĉiu **avara** generacio volis, ke la malfeliĉo falu sur la estontajn generaciojn!"

"Do, avinjo, mi devas diri al vi ion, ĉar mi neniel povos pardoni min, se mi ne faros tion. Vi scias, ke mi en la lernejo studas **besto-bredadon**, kaj tie oni devas vidi verajn bestojn kaj kresk-aĝ-ojn. La pordo, kiun vi vidas tie, kondukas al la ĝardeno, kie troviĝas la lastaj kelkaj bestoj de nia malfeliĉa mondo. Estas eĉ mal-facile en-iri. Tre multaj paperoj estas bezonataj".

"Ho, kiel ŝanĝ-iĝ-is la mondo! Do nun la mondaj registaroj kulturilo mondon el verda **kaŭĉuko**, tiel ŝajn-ig-ante, ke ne estas problemo! Ho, mi ne planis pas-igi miajn lastajn tagojn tiel. Bonvolu, ni iru hejmen".

Dum mia nepo gvidas min el la Kaŭĉuka Mondo, mi ne scias kial li ŝajne ne timas. La mondo, en kiu li loĝas, jam for-pasis! Li eble jam akceptis la gravecon de la problemo pri la mondo kaj pri-pensas ĝin, aŭ li tute ne rimarkas la problemon.

Kaj jen per miaj lastaj spiroj mi preĝas por li kaj lia mal-feliĉ-ega generacio, ke ili ricevu la ĉielan kompton.

**generacio** – ĉiuj homoj, kiuj naskiĝis proksimume en la sama tempo; ekzemple, fratoj apartenas al la sama generacio, dum la gepatroj kaj iliaj infanoj – jam al diversaj

**elefanto** – la plej granda sur-tera besto

**leono** – granda kat-simila, "reĝo de bestoj"

**laŭdi** – diri al iu bonajn vortojn pro bone farita laboro

**dresi** (bestojn) – instrui al bestoj iujn taskojn kaj specialajn movojn, kiujn ili nature ne faras

**revo** – penso pri tio, kion oni ne havas, sed tre volas havi

**instinkto** – (ĉi tie) kontraŭ-vola deziro fari ion, kion ni ne komprenas

**detru** – neniigi, mal-fari, fari ion malbona, ne-uz-ebla

**plasto, kaŭĉuko** – modernaj nenaturaj materialoj

**avara** – kiu ne volas doni ion sian al aliaj homoj, havema

**bredado** – zorgado pri bestoj, ke ili vivu bone kaj havu multajn idojn





# Ŝlosita seruro

Maksim Petrov, Kazahio

Verŝajne venis tempo rakonti pri okazaĵo kun homo, kiun mi konis. Lia nomo estis Paŭlo. Lige al tiu ĉi evento aperis multaj elpensaj kaj onidiroj; se la historio okazus en granda urbo, pri ĝi jam sekvatage skribus ĉiuj poramasaj gazetoj. Sed nia urbeto estas malgranda kaj ĉi tie oni eldonas nur unu gazeton – “La nova vojo” (ĝi estas jam sepdekjara, sed “la vojo” estas same “nova”), en kiu oni publikigas nur unuformajn edifajn artikolojn pri interna politiko de la ŝtato kaj krimkronikon. La urbeto estas kvietna, provinca, tial ĉi-loke malofte okazas io neordinara.

Dum lernado en urba teknika lernejo mi eksciis pri unu studento de energetika fakultato. Tuj post kiam li komencis la lernadon en ĉiuj grupoj aperis paroladoj pri strangajoj de tiu ĉi junulo. La unua atentinda afero estis lia parolmaniero. Lia parolo estis rigore kontrolita de la leksika vidpunkto: eĉ ne unu slanga kaj tiom pli insulta vorto. Sed ni ja tiam estis adoleskantoj kaj permesis al ni grandan familiarecon – ni povis laŭte ridegi, senĝene gestadi, eldiri maldecajn ŝercojn... Li tamen neniam permesis al si ion similan. Ankaŭ lia solecemo aspektis strange: li ne ekhavis en la nova loko amikojn, kiel faris la aliaj. Kiam ni devis atendi instruiston kaj staris apud fermita pordo, li preferis foriri ien en alian ejon aŭ eĉ etaĝon.

Komence tio mirigis ĉiujn, kaj poste aparte viglaj sudentoj dum la interlecionaj paŭzoj komencis la pridemandadojn, ĉirkaŭante lin. Mi ne scias, pri kio estis la demandoj, sed post iom da tempo mi

eksciis: kiam oni traktis Paŭlon malĝentile (tio komenciĝis post kiam oni konvinkiĝis pri lia toleremo al homoj) aŭ eĉ pugnofrapis lin dum leciono, li ne rebatis responde. Nur demandis: kial oni faras tion? Sed niaj facilanimaj studentoj reeĥis proksimume tiel: “Ĉar vi estas... (kaj iu kruda vorteto)”. Responde li nenion diris, forturnis sin kaj daŭre okupiĝis pri propraj aferoj aŭ foriris. Estas interese, ke li neniam plendis al iu.

Nur nun, rememorante ĉion, kio okazis, mi povas pli-malpli certe diri, kial li tiel agis. Ŝajnas al mi, ke li estis tiel indiferenta al ni pro du kaŭzoj. Unue, ĉies malrespekto kaj moko igis lin rilati al ni kiel al la homoj, kiujn ne meritas lian komunikadon. Tio estas natura kaj evidenta: kiam homo ne trovas komprenon en iu medio, li serĉas alian komunikadon – aŭ kun aliaj homoj, aŭ okupiĝante pri la ŝata afero, por ne senti sin soleca. Due... sed mi rakontos laŭ la ordo.

Tiel pasadis tempo, kaj ĉiuj jam alklitimiĝis al tio, ke ĉiutage Paŭlon mokas ĉi deziranto, kaj li toleras ĉion. Certe li ne eltenis tute rezignacie niajn “surprizojn”, kaj povis iufoje diri kelkajn frazojn pri nia nepraveco... Sed ne pli, ĉar la forton li neniam uzis. Kiel ĉio ĉi finiĝus, mi ne scias, sed poste okazis io neatendita.

Komenciĝis somero, finiĝis la unua stud-jaro, kiam ni eksciis, ke mortis lia patro. Sed ne li mem diris tion; ni aŭdis tiun onidiron jam post la enterigo. Tamen lia sinteno ne ŝanĝiĝis, kvankam aperis elpensajoj pri lia baldaŭa foriro al internulejo, ĉar aliajn parencojn li ne havis. Ni malklare konsciis, kiel malfacila estis ĉio ĉi por li: trafi fremdan medion, komenci ĉion denove – post ĉiuj malbonaj

okazaĵoj, spertitaj inter ni. Sed Paŭlo, eĉ se lin turmentis la timo pri propra futuro, neniel elmontris sian animstaton. Tamen, ĉu bone ni konis lin?

Pasis ĉirkaŭ dek tagoj post tio. Nia grupo kolektiĝis antaŭ komenco de leciono en unu el klasĉambroj; tie staris ŝaltita televidilo. Tiutempe en televido estis montrata iu japania animacia filmo – io fantazia, pri kosmo, pri paca futuro de la homaro... La filmo nenium el ni maltrankviligis aŭ altiris: ordinara filmo, pli preferinda por infanoj, ol por ni, “veraj viroj”. Sed Paŭlo, kiel mi komprenas, simple enamiĝis al ĝi kaj rigardis la ekranon sen formovi la okulojn. Tiutempe la ĉambrom komencis pleniĝi la grupanoj. Kreskanta bruo, senorda babilado, rideksplojoj malhelpis Paŭlon aŭskulti, kaj li alsidiĝis pli proksime al la televidilo. Poste Paŭlo ekstaris tute apud ĝi. Ĉiuj, certe, turnis la atenton al la interesiĝo pri la porinfana amuzaĵo. Kiel kutime, eksoneis mokaj demandoj, krudaj ŝercoj pri okazaĵoj en la ekrano. Komence Paŭlo penis fiksaŭskulti la televidilon, sed poste subite turnis sin al ni. Li rigardis sen sia kutima apatia pacienco. Kun domaĝo kaj eĉ incitite li diris: “Mi tuj finrigardos!” Tuj aŭdiĝis duonŝercaj-duonseriozaj minacoj al lia adreso... sed li nur ĝibetiĝis, proksimiĝis al la televidilo kaj apogis sin sur ĝia korpo.

Tiumomente la lumo estingiĝis. En falinta duonmallumo akute ekkriis la knabinoj, ekbabilaciis la buboj. Iu elkuris en la koridoron por reŝalti elektron. Kiel evidentiĝis, okazis bagatelo – pro superŝargo malŝaltigis la aŭtomata gardilo. Kiam (nur post dek minutoj) la lumo reaperis, evidentiĝis, ke la televidilo montras jam nenion plu. Nur tiam oni rememoris, ke la lasta rigardanto estis Paŭlo. Kaj tuj post la ĝojo pri la trovo de la kulpulo, oni subite komprenis, ke li malaperis. Li reaperis en la lecionoj nek tiutage, nek sekvatage, nek post semajno. Paŭlo foriĝis por ĉiam.

Oni serĉis lin dum kelkaj monatoj. La versio pri lia forkuro altrudiĝis per si mem: kaj lia patro mortis, kaj al la internulejo li devis transiri, kaj ankaŭ la televidilon li difektis... Aliflanke, ĉiuj sciis, ke Paŭlo havis kvietan, modestan karakteron, kaj jen tiel subite ekkuri neniu scias kien – tio estus nekredibla. Kien kaj por kiom da tempo li povus foriri sen mono, sen dokumentoj? Tamen, oni neniam trovis lin, li malaperis senspuro. Tiam, en kabineto, li eĉ lasis propran librosakon, kaj tiu ago ne estis karakteriza por li.

Onidiroj cirkulis longe, kaj en la techni-

ka lernejo, kaj en la urbo. Iufoje estis eldirita tute fantazia supozo – kvazaŭ Paŭlo tiam “foriris” trans la televidilon en alidimensian mondon. Tion, certe, kredis neniŭ; la plimulto emis akcepti la opinion, ke li simple forkuris. Se paroli pri mi... mi foje pretas ekkredi, ke Paŭlo “foriris” en ekranon de la televidilo – kaj jen kial.

Kio mirigis ĉiujn en lia sinteno rilate al la ĉirkaŭuloj? Lia rezigneco, apatiemo, indiferenteco. Oni pri li ridis, oni humiligis lin, sed Paŭlo ne reagis al tio. Certe, li ofendiĝis, sed ne tiom forte por restarigi la perditan dignon per fizika forto. Tamen tiam, en sola kaj lasta fojo, ni rimarkis en lia sinteno ian maltrankvilecon, allogiĝon, eĉ pasion – kaj pro kio? Pro iu filmo?

Lia konscio estis strange “renversita” – al realo li rilatis kiel al nerealo kaj inverse. Li pli fidis elpensadojn, ol realecon. Ju malpli li certis pri realo, des pli mergiĝis en revon. Eblas, ke tio estis revo pri la mondo, kie li vivus inter bonaj homoj, estus egala al ili, fine trovus veran liberecon, amikecon, feliĉon... ĉion, kion li ne havis ĉi tie. Tiam lia racio, rompetita fare de vico de malfacilaĵoj, jam rezignis akcepti kaj pripensi pluajn malsukcesojn. Kaj lia koro, kaŝita de ĉiuj, forbrulinta pro neefektivigeblaj deziroj pri konsolo, subite eksplodis, ekardis je varmega deziro pri liberiĝo. Tiu ĉi impeto estis tiel forta, ke ĝi disfaligis la murojn, kiuj lin ĉirkaŭis.

Mi ne kredas je lia morto. Li foriris

ien... Ĉu vere en tiun mondon, unu el aro da eblaj, kiuj iam ajn ekzistis aŭ ekzistos en realo aŭ en ĉiuj homaj elpensadoj, eĉ en la plej nekredablaj?

Ĉiuj ni, homoj, ĉiam hastantaj en vantaj persekutoj de la plej necesaj (kiel al ni ŝajnas) aĵoj, neniam aŭ preskaŭ neniam eĉ malklare komprenas iluziecon de nia ekzistado. Necesas io surdiga, faliga, por ke ni vekigu kaj provu ekvidi la mondon veraspekte. Kio bezonatas por ekkoni la sencon de la vivo? Ĉu la morto, ĝia alproksimiĝo? Ĝi estas ja tro kruda procedo rememorigi pri la eternaj veroj... Sed estas tiaj homoj, kiuj dekomence sentas kaj komprenas propran ekzistadon; ili scias, kial kaj por kio ili vivas, ne perdante el vido inter ĉiuj ventoj kaj nebuloj la eternan celon ie trans horizonto de la vivo. Ili scias, ĉar ili kredas. Tiaj homoj estas tre malmultaj. Kaj jen la vortoj nur pri unu:

“Per la fido Ĥanoĥ estis transportita, por ne vidi morton; kaj li ne estis trovata, ĉar Dio lin transportis.” (Hebreoj, 11:5).

Certe, foriro for de la realo atestas pri propra senforteco antaŭ malamika mondo. Kaj se Paŭlo ne humiliĝus, ne ĉesus lukti, li certe venkus! Tamen, kion mi scias pri li por paroli tiel? Li havis maloftan talenton – kapablon sincere kaj senrezerve kredi. Se tiam iu subtenus lin, li verŝajne povus krei multon en sia vivo.

Mi tre kulpas antaŭ vi, Paŭlo.

Kia estus vi, se vi revenus?



## Ŝi

Maksim Petrov, Kazaĥio

Mi scias certe – ŝi amas min.

Kiam mi venas en ŝian hejmon, ŝi tuj elliras renkonten al mi, emocie kaj atendante rigardas min. Mi eksidas sur fotelon kaj ŝi iras al mi por eksidi ĉe mian sinon. Premiĝante al mi tutkorpe, ŝi kviete kaj kareseme paroladas al mion, kaj mi karesas ŝiajn kapon, dorson, admirante ŝiajn verdajn okulojn. Responde al miaj tuŝoj ŝi ofte kisas miajn manojn. Ankaŭ mi rakontas al ŝi pri io, kaj ŝi silente aŭskultas, fermetinte la okulojn.

Kiam mi kuŝiĝas en liton por dormi, ŝi jam apudas. Ŝi metas sian kapeton sur mian bruston kaj petas kareson. Mi ne igas ŝin atendi min. Ŝi kuŝas apud mi, plilongiĝinte tutkorpe, kaj mi komencas karesi ŝiajn ŝultrojn, brus-

ton... Ŝi ege ŝatas, kiam mi ame tuŝas ŝian ventron. Ĉi-momente ŝi simple ĝemas pro ĝuo. Foje ni ŝerce luktas kune. Kaptinte ŝin, mi forte ekpremas ŝin en mia ĉirkaŭpreno. Ŝi elŝiriĝas, gratante min per siaj maldikaj, sed fortaj fingroj, mordas miajn manojn. Poste ŝi kisas la mordlokojn, kvazaŭ petante pardonon. Fine ni endormiĝas. Ŝi kuŝas, alpremite sian varman korpon al mi. Matene ŝi vekas min per siaj tuŝetoj, vokante min por matemangi.

Antaŭe mi vizitis ŝin ĉiusemajne, sed nun, pro la okupiteco, malpli ofte, ol unufoje dum monato. Certe, mi scias, ke ŝi havas aliajn virojn. Sed nur apud mi ŝi sentas sin virino, sed ne simple ino por siaj amorantoj. Kaj tutegale ŝi atendas min, kaj ĉiufoje reeĥos kun ĝojo, ekaŭdinte, ke mi vokas ŝin per la nomo. Ŝi ne vidas miajn difektojn, ŝatante min simple pro tio, ke mi estas ĉe ŝi. Mi tre bedaŭrus se ŝi subite malaperus por ĉiam.

Jen tia estas ŝi – mia amata katino.

Bumerange

## “Metafanismo”?

Wendel Teles Pontes, Brazilo

Mi volus opinii pri la artikolo “Mistero: vitro, kiu venas... el la kapo?” Se la priskribita fakto ne estas trompo, ni povas konsideri ĝin parapsikologia fenomeno. En tiu scienco, kiam homo elpuŝas objektojn el sia propra korpo, la okazaĵo nomiĝas “metafanismo” (ĝi ne estas PIV-a vorto – Red.). Fakte, metafanismo inkluzivas ankaŭ aliajn fenomenojn: kiam homo malaperas kaj aperas en alia loko, kiam sango aŭ aliaj substancoj de iu homo aperas en aliaj objektoj proksime al li/ŝi. Tiuj viroj aŭ virinoj, kiuj respondecas (ofte senkonscie) pri tiuj nenormalaj faktoj, nomiĝas PSI-agentoj (“psi” devenas de la radiko “psiko”, kiu signifas menso), aŭ, laŭ kelkaj kredoj, mediumoj. En la parapsikologia verkaro estas multaj mencioj pri tiuj neordinaraj fenomenoj. Bedaŭrinde, mankas fakvortoj en Esperanto, kiuj permesas diskuti tiajn ideojn. Sed la cirkonstancoj gvidas nin al tiu klarigo.

# Ekkonu Urugvajon!



Tradiciaj karnavalaj stratmuzikistoj en Urugvajo

*Daniel Richard Bebelacqua Acosta, Urugvajo*

**Hodiaŭ mi invitas vin konatiĝi kun mia patrujo – Urugvajo, eta lando en Suda Ameriko. Unuavide Urugvajo aspektas kiel normala eta lando, sed kiam oni ekkonas ĝin, oni trovas, ke ĝi estas multflanke kontrasta lando.**

## Urugvajo: Kio ĝi estas? Kie ĝi estas?

Havante la areon de ĉ. 177 mil kv. km, Urugvajo estas la plej eta lando de Sudameriko. Tamen la landoj-najbaroj estas la plej grandaj: okcidente Urugvajon limas Argentino, norde kaj oriente – Brazilo. Sude la limoj estas la Atlantika Oceano kaj la *Río de la Plata* (Rivero de Mono aŭ Rivero de la Arĝento – en mia lando familiare oni nomas monon arĝento). La limon inter Argentino kaj Urugvajo formas du riveroj: la jam menciita Rivero de la Arĝento kaj Rivero Urugvajo, kiu alfluas la Riveron de la Arĝento kaj kiu donas la nomon por la tuta lando (la plena landnomo estas Orienta Respubliko de Urugvajo). Fakte la Rivero de la Arĝento estas tro larĝa por nomi ĝin rivero, sed ĝi ankaŭ ne estas maro. La indiĝenoj nomadis ĝin antikve “Paraná Guazú”, tio signifis “rivero tiel larĝa kiel maro”. Tiu rivero alfluas la Atlantikan Oceanon.

## Geografie kaj ekonomie

Urugvajo ne havas montojn. La plej alta monteto estas proksimume 520 metrojn alta. Bonŝance, urugvajanoj konas nek tertremojn, nek martremojn, nek vulkanojn, nek uraganojn. Nur unu aŭ du fojojn dum la antaŭa jarcento falis iomete da neĝo en iu eta loko de nia lando. La klimato estas varmeta: en la suda parto de la

lando vintre la temperaturo nur malofte falas sub nulon, kaj somere la plej altaj temperaturoj estas 36-37 gradoj C. En la norda parto pro la pli seka klimato la vintro estas iom pli malvarma, kaj somero estas iom pli varma, ol en la suda parto.

Malgraŭ la relative granda areo de la lando (nur laŭ la eŭropaj mezuroj, ĉar por Sudameriko tio tute ne multas), la tuta loĝantaro estas malpli ol 4 milionoj da homoj.

Administre Urugvajo estas dividita en 19 partojn (departementojn). Ĉiu departemento havas kelkajn urbojn kaj urbetojn. La plej eta departemento estas Montevideo, kies unusola urbo ankaŭ nomiĝas Montevideo. Malgraŭ la area eteco de la departemento, Montevideo estas la plej granda urbo kaj la ĉefurbo de la lando, kaj ĉi tie aperas la unua kontrasto: Montevideo (urbo) havas ĉirkaŭ 1,5 milionojn da loĝantoj: preskaŭ duonon de la tuta urugvajana loĝantaro.

La dua kontrasto: la ĉefaj eksportaĵoj de Urugvajo estas produktoj de agrikulturo kaj bestobredado, tamen preskaŭ 90% de la loĝantaro vivas en urboj, kaj ĉiutage pli kaj pli da homoj movas sin de la kamparo al la urboj.

## Socie kaj edukade

Ankaŭ ĉi tie oni facile trovas kontrastojn. Urugvajo ne estas disvolviĝinta lando, sed oni trovas en ĝi kelkajn tipajn trajtojn de la evoluantaj landoj. Proksimume 99% de la loĝantaro (se kalkuli la personojn, pli aĝajn ol 6-jarulojn) scipovas legi. La relativa kvanto de kuracistoj estas granda, tial la atendata vivo-daŭro estas apenaŭ malpli granda ol en multaj eŭropaj landoj. Pro tio la pli granda parto de la loĝantaro de Urugvajo ne estas juna.

En Urugvajo ekzistas privata kaj publika edukado. La ŝtata (publika) edukado estas senpaga kaj konsistas el kelkaj ŝtupoj: prizorgado de 4- kaj 5-jaraj infanoj, baza kaj meza lernejoj kaj universitato. La vizitado de la baza lernejo (kie la studado daŭras 6 jarojn) estas deviga. Bazaj kaj mezgradaj lernejoj ekzistas en la tuta lando, multas ankaŭ diversaj liceoj kaj teknikaj lernejoj, tamen universitato, bedaŭrinde, ekzistas nur en la ĉefurbo.

Lastatempe oni povas vidi, ke la registaro ŝajne volas, ke edukado iom post iom transiru al privataj manoj. Dum unuflanke multaj instruistoj ne havas laboron, la nunaj reguloj diras, ke lerneja klaso (grupo) devas enhavi ĉirkaŭ 35 aŭ 40 lernantojn. Pro tio multaj lernejoj, kie, laŭdire, estas tre malmulte da lernantoj, estas fermataj. Tiu situacio igas la homojn sendi siajn gefilojn en privatajn lernejojn, kiuj ĉiam pli kaj pli multas. Sed de tago al tago ili estas ankaŭ pli kaj pli kostaj. Tamen en la ŝtataj lernejoj la nombro de lernantoj en klaso konstante pligrandiĝas, pro kio la edukad-kvalito falas.

## Historie

La historio de Urugvajo ne estas tro longa. Antaŭ ol hispanoj malkovris Amerikon, en la lando loĝis nur kelkaj indiĝenaj triboj. Ne temas pri evoluantaj triboj kiel inkaoj, majaoj aŭ aztekoj, – ĉi tie loĝis pli simplaj gentoj, famaj pro kuraĝo kaj amo al sia tero. Tamen, malgraŭ la braveco, preskaŭ ĉiuj niaj indiĝenoj estis mortigitaj. La lastaj el ili estis mortigitaj pro perfido de unu el niaj unuaj prezidentoj dum la liberiga milito –



José Gervasio Artigas (desegnita de Juan Manuel Blanes)



jen kontraŭdiro, ja la indiĝenoj ĉiam helpis batali kontraŭ la konkerintoj. Ankaŭ nia plej granda heroo, José [ĥose] Gervasio Artigas, ĉiam apogis la liberecon kaj indecon de la indiĝenoj.

Antaŭ la sendependiĝo de Urugvajo la lando estis konkerita de hispanoj, portugaloj, brazilanoj, angloj kaj aliaj koloniistoj. Jam menciita heroo Artigas estris la luktadon kontraŭ la konkerintoj en 1811. Li instruis al la urugvajanoj la ideojn pri libereco, penis ebligi liberan ter-uzadon kaj edukadon por ĉiuj. Artigas volis fari grandan patrujon inter Urugvajo (kiu tiam nomiĝis “la orienta ter-strio”) kaj kelkaj argentinaj provincoj, tamen li estis venkita kaj li kun siaj homoj iris for el Urugvajo dum la t.n. “Amaseliro de la Orienta Popolo”. Poste li revenis kaj daŭre batalis, sed post multaj perfidoj li definitive foriris en Paragvajon.

Tamen liaj ideoj kaj idealoj restis, kaj kelkajn jarojn poste Juan [ĥuan] Antonio Lavalleja [lavaljeĥa] kun malmultaj homoj (kiuj poste estis nomitaj “la 33 orientanoj”) denove eniris Urugvajon el Argentino kaj komencis la rekonkeron de la lando. Multaj homoj aliĝis al li kaj fine la 25-an de aŭgusto 1825 Urugvajo estis deklarita sendependa. Kelkajn jarojn poste estis akceptita la unua konstitucio. De tiam ĝis nun multaj gravaj homoj agis en la lando. Kleraj urugvajanoj estis: José Batlle y Ordóñez [ĥose batlje i ordonjes] – prezidento en la unua duono de la 20-a jarcento, respondeculo pri la labora reformo; José Pedro Varela [ĥose pedro varela] – politikisto, kiu luktis por ke la publika urugvajna edukado estu senpaga, laika (nereligia) kaj deviga, almenaŭ por la baza lernejo; José Enrique Rodó [ĥose enrike rodo] (verkisto kaj filozofo) kaj multaj aliaj.

Dum la 20-a jarcento la lando spertis kelkajn diktatorajn reĝimojn. La lasta kaj eble la plej grava daŭris de 1973 ĝis 1984. Dum tiu tempo multaj homoj estis malaperigitaj aŭ rekte mortigitaj. Nun la civitanoj estas en la lasta fazo de reunuiĝo de la popolo post la diktatora reĝimo: la registaro kreis “komisionon pri la paco”, kiu intencas malkovri la destinon de ĉiu “malaperinto”. La militistoj, kulpaj pri la antaŭa reĝimo, rakontas al la komisiono ĉion, kio okazis, sed ili ne estas juĝataj. Kiel ni scias nun, ĉiuj plenkreskaj malaperintoj estas mortaj, kaj multaj malaperintaj infanoj estis donitaj al aliaj familioj (urugvajaj kaj argentinaj). Iom post iom kelkaj geavoj povas konatiĝi kun siaj genepoj, kiuj loĝas kun aliaj familioj. Malgaja historio, sed almenaŭ kun trankvila fino.



Placo Gomensoro en Pocitos (Montevideo)

### Turisme: multaj vidindaĵoj

Por tiuj, kiuj ŝatas maron kaj sunon, Urugvajo havas multajn plaĝojn. Elstaras la ripoz-loko Punta del Este (“Pinto de la Oriento”), kie somerumas tre konataj homoj el la tuta mondo; la urbo havas ankaŭ aktivan noktan vivon. La urbo famas pro tio, ke ĉi tie unuiĝas la Rivero de la Arĝento kaj la oceano. Ĉe la okcidenta marbordo de Pinto de la Oriento, la plaĝoj havas dolĉajn kaj trankvilajn akvojn el rivero, dum ĉe la orienta marbordo plaĝoj havas salan akvon el oceano kaj grandajn ondojn. En la departemento Rocha [roĉa] (kie, interalie, oni parolas la hispanan lingvon plej bone en la lando) troviĝas fama ripoz-loko La Paloma (“La Kolombo”). En la norda parto de la lando troviĝas multaj banejoj kun nature varmaj akvoj, varmigataj de la bonkora patrino Tero.

Antaŭ nelonge en la lando aperis novaj turismaj proponoj: ekologia turismo kaj turismaj kampobienoj. Temas pri kampobienoj aranĝitaj por ĝui la etoson de la naturo. Iuj el ili funkcias kvazaŭ hoteloj, kie loĝantoj povas ĝui komforton, troviĝante meze de kampara medio. La aliaj proponas diversajn aktivajn por amuzi turistojn (rajdadojn, promenadojn, naĝadon); aldone, en multaj bienoj oni povas por amuzo provi sin en iuj kamparaj laboroj (ekz., melki bovinojn, kapti fiŝojn, haki lignaĵon aŭ partopreni ĉas-ekskursojn).

Malgraŭ tio, ke la lando estas relative juna kaj la konstruaĵoj estas plejparte modernaj, ankoraŭ restas vizitindaj lokoj kun malnovaj konstruaĵoj de la tempoj, kiam eŭropanoj komencis loĝi ĉi tie. La departemento Colonia [Kolonja] havas kelkajn urbojn kun multaj antikvaj kon-

struaĵoj. La urbo Colonia Suiza [kolonja suisa] (“Svisa Kolonio”) estis fondita de la unuaj svisoj, kiuj loĝis ĉi tie. La konstruaĵoj estas tipe svisaj kaj multaj el iliaj loĝantoj konservas la svisajn tradiciojn (inkluzive bongustajn svisajn manĝaĵojn).

Aparte vizitinda loko por esperantistoj estos, verŝajne, la Internacia Placo, kiu troviĝas norde de la departemento Rivera. Tiu granda placo apartenas duone al Urugvajo, duone al Brazilo kaj estas parto de granda strato, kiun la loĝantoj nomas simple *la línea* (“la linio”). Se vi transiras La Linion de unu trotuaro ĝis la alia, vi vojaĝas de unu lando al la alia. La vojaĝo povas okazi ankaŭ en la tempo: somere Brazilo antaŭigas siajn horloĝojn je unu horo, tial, se vi ekiras de la urugvajna trotuaro je la 5-a horo, kiam vi post kelkaj sekundoj atingos la brazilan trotuaron jam estos la 6-a horo.

### Festoj kaj okazaĵoj

En Urugvajo estas multaj festoj, tamen jen la plej interesaj por la landanoj kaj por turistoj.

Karnavalo: tiu festo estas populara en multaj landoj, sed en Urugvajo ĝi estas la plej longa – kutime ĝi daŭras de 45 ĝis 60 tagojn. Oficiale oni rajtas ne labori nur dum la unuaj tri tagoj, sed la festo kunvivis kun labortagoj dum pli ol unu monato. La ĉefaj eventoj okazas en la ĉefurbo, Montevideo. Dum la unua tago la karnavalaj grupoj kantante paradas en belaj kostumoj en la ĉefa aleo. Ĉiuj grupoj partoprenas en la konkurso kaj ricevas poentojn pro kantado, dancado, aktorado; la plej bonaj grupoj poste prezentas sin en la



La plej malnova preĝejo en Urugvajo (urbo San Karlos)

urba teatro, la aliaj faras prezentojn en diversaj urbokvartaloj. La partoprenantoj plejparte ne estas profesiuloj, ili estas simplaj laboristoj, oficistoj ktp., kiuj volas kanti kaj festi karnavalon. Sed ĉiujare la nivelo de la prezentadoj pliboniĝas. Kelkaj grupoj iĝis tiel famaj, ke por ili la

prezentado estas jam laboro: ili prezentas sin en veraj teatroj diversloke kaj ankaŭ en aliaj landoj.

Dum la tiel nomata Kreola Semajno multaj kamparaj societoj organizas diversajn tradiciajn kamparajn aktivadojn, ekz. konkursojn pri ĉevaldresado, preparadon de tradiciaj manĝaĵoj ktp. Aparte interesa estas la tiel nomata “kontrapunto” [kontrapunto]: ĝi estas konkurso, dum kiu du kantistoj (nomataj “payadores” [pajadores]) kantas unu post la alia partojn de la samtempe elpensata kanto tiel ke la versoj de la dua kantisto devas respondi al la versoj kaj rimoj de la unua.

De antaŭ proksimume dek jaroj en la

lando estas tre populara la festo, nomata “Noche de la nostalgia” [noĉe de la nostalgija] (“Nostagio-nokto”). Ĝi estas la nokto, kiam en diversaj dancejoj estas prezentata malnova muziko por “ne-trojunuloj”.

Alia populara “nokta” festo estas la tiel nomata “La noche de las luces” [la noĉe de las luses] (“Nokto de la lumoj”). Ĝi okazas kelkajn tagojn antaŭ la Kristnasko kaj dum tiu festo ĉe la marbordo de Montevideo en la kvartalo Pocitos oni aranĝas multajn artfajraĵojn. Dum proksimume 15-20 minutoj la ĉielo de Montevideo pleniĝas je diverskoloraj lumoj. Miloj da homoj speciale venas por bone vidi la spektaklon.

Tiel finiĝas nia imaga vojaĝo tra Urugvajo. Mi esperas ke ĉi tiu vojaĝo estis agrabla por vi.

# El la taglibro

(daŭrigo. Komenco estas en *KONTAKTO* 215-216, 2005:5-6)

*Dmitrij Cibulevskij, Ukrainio*

## Merkredon, la 6-an de februaro

Pasis ankoraŭ unu monato. Jam finiĝis vintra sesio, mia unua ekzamensesio en la instituto, dum kiu mi sukcesis fari ses ekzamenojn. Mi ricevis eĉ ne unu malbonan poenton, nur la bonajn kaj perfektajn. Ankaŭ Nikolaj Petroviĉ estis unu el la ekzamenintoj. Kun li ni pli multe parolis pri diversaj problemoj, sed ne pri la temo de la demandoj.

La dusemajnaj ferioj same pasis iel nerimarkeble rapide. Kaj jen denove komencitaj lecionoj, seminarioj, lekcioj. Kiel oni kantas en populara kanto “...kutima vivo kaptis nin...”

Tamen, ankoraŭ pri unu afero mi nepre devas noti. Evidentiĝis, ke tiu mia referaĵo, kiun siatempe laŭdis Nikolaj Petroviĉ, estis prezen-

tita por la tuturba konkurso de studentaj verkoj kaj okupis tie la unuan lokon. Kiel sinsekvo estis propono prezenti ĝin por la tutlanda konkurso. Kaj mi, kiel aŭtoro, kun Nikolaj Petroviĉ, kiel mia edukanto-instruisto, devos kune veturi en la ĉefurbon. De unu flanko, tio tre plaĉis al mi, de la alia – iom timigis. Mi la unuan fojon devas veturi ien en alian urbon ne kun la gepatroj, sed kun iu viro. Certe, mi jam ne estas infano, sed ankaŭ ja ne plenkreska virino.

Nikolaj Petroviĉ demandis min, ĉu mi hazarde ne verkas versojn aŭ rakontojn. Kaj kiam li ekaŭdis la jesan respondon, li proponis kunporti ion.

- Eble, se estos libera tempo, pri kio mi esperas, ni tie vizitos literaturistojn.

## Ĵaŭdon, la 7-an de marto

Dum la tuta monato mi nenion metis en la taglibron. Certe mi ne kunportis ĝin en la vojaĝon, ĉar mi opiniis, ke por ion enskribi mi ne havos la tempon. Kaj tiel estis.

Unue, pri la konkurso. Ĉu la aliaj laboroj de studentoj el la lando estis ne tiom bonaj, aŭ vere mia referaĵo ion signifis. Mi ne atendis tian sukceson, sed mia laboro okupis la duan lokon, kaj mi eĉ ricevis, krom diplomon, monpremion.

Mi neniam ĝis nun vizitis la ĉefurbon. Mi fakte ne povas diri, ke mi malofte vojaĝis – multajn urbojn mi vizitis, estis en monta regiono, veturis persipe. Sed viziti la ĉefurbon mi ĝis nun ne bonŝancis.

Eksciinte tion, Nikolaj Petroviĉ dediĉis la tutan tagon al ekskurso tra la urbo. Ni tamen ne uzis la servojn de oficialaj ekskursejoj. Nikolaj Petroviĉ, anticipe min demandinte, proponis sian helpon. Mi ne povas kompari, sed ŝajnas al mi, ke pli bone povus ekskursigi eĉ ne unu ĉiĉerono – tiom bone Nikolaj Petroviĉ konis la urbon. Kvazaŭ li estis denaska lokano. Li sciis eĉ etajn nuancojn, kaj ĉion ĉi rakontis al mi.

## Vendredon, la 8-an de marto

Hodiaŭ estas la festo. Internacia Virina tago. Kaj ekde mateno, uzante la liberecon, mi daŭrigas la hieraŭan priskribon. Hieraŭ mi ja ne povis finskribi – la okuloj fermiĝis, kvazaŭ mi ne dormis la tutan semajnon. Sed eble hodiaŭ mi sukcesos priskribi ĉion, kio estis en la ĉefurbo.

Do, pri la ekskurso. Ni tiutage trairis perpiede eble tridek kilometrojn. Nikolaj Petroviĉ mem ŝatas piediradi, des pli dum similaj okazoj. Ja por bone ekscii la urbon necesas ĉirkauiri ĝin, sed ne uzi, kiel oni ŝatas metroon, aŭtobusojn aŭ aliajn specojn de la urba transporto. Sed estante kultura homo, li ĉiam interesiĝis pri mia laceco – ĉu mi ne lacas? Kaj ofte iniciatis diversajn haltojn por ion trinki, ripozi surbenke (feliĉe la vetero favoris!).

Ni rigardis la centron de la urbo. Memkompreneble, tio necesis. Sed ni vidis ankaŭ la lokojn, kiujn kutime ekskursantoj ne vizitas.

Kaj jam vespere ni venis al iu domo, en kiu, kiel evidentiĝis, unufoje dum du semajnoj kolektiĝas literaturistoj. En la ĉambro homoj ne multis – estis eble dudeko da divers-



aĝuloj. Ŝajnas, ke la gejunuloj kaj pliaĝuloj estis egalkvantaj. La pli aĝaj kondutis kiel ia elito, preskaŭ malrespekte rigardante la pli junan generacion. Ankaŭ kun ia "fiado" ili aŭskultis novajn verkojn de la gejunuloj. Al mi tre plaĉis versoj de unu el la junaj poetoj, bedaŭrinde mi memorfiksis nur kvar liniojn:

*Li fanfaronas pri la venkoj,  
Pri amindumo, seksumad'.  
Sed en la lito tuj videblas,  
Ke tio estis falsbravad'.*

Ankaŭ mi kontraŭvole, laŭ la insisto de Nikolaj Petroviĉ tralegis la miajn, kie estis tiuj vortoj:

*Kutime am' neatendite  
Aperas en dormanta kor'.  
Mi manĝas jam senapetite,  
Pri li nur pensas kun angor'.*

Memkompreneble, miaj versoj estis aŭskultataj en plena silento, ankaŭ post kiam mi finis legi dum ioma tempo regis la sama silento. Mi bone komprenis, ke la versoj estis malaltkvalitaj, sed mi ĉiam opiniis, ke indas almenaŭ iom subtenadi novajn aŭtorojn.

Nur Nikolaj Petroviĉ jam alie min rigardis.

Entute mi estis tre kontenta pri la vojaĝo en la ĉefurbon – kaj la urbon mi rigardis, kaj la premion akiris, kaj la literaturistojn vizitis. Kaj certe mi multe pli bone ekkonis nian instruiston pri literaturo, Nikolaj Petroviĉ.

Kaj certe mi neniam forgesos la rean vojon. Ni por la reenveturo elektis trajnon, kio estis tre oportuna – vespere ni envagoniĝas, kaj jam matene venas en nian urbon. Necesas pasigi en la trajno nur unu nokton.

Ni estis en la kupeo kvarope: mi kun Nikolaj Petroviĉ kaj ia duopo de mezaĝuloj, kiuj preskaŭ tuj enlitiĝis.

Nikolaj Petroviĉ proponis iom festeni pro la sukceso de nia referaĵo. Fakte, la referaĵo estis mia, sed Nikolaj Petroviĉ diris ĝuste "nia", kaj mi ne kontraŭis. Ja ankaŭ li kontribuis kaj ĉefe influis al la laboro.

El la negranda vojaĝsako Nikolaj Petroviĉ elprenis iajn manĝaĵojn, grandan botelon da ia akvo aŭ suko kaj botelon da krimea vino. Ordinare mi ne trinkas alkoholaĵojn. Sed

hejme mi iam gustumis kaj brandon, kaj konjakon, kaj vinon. Kaj poste mi decidis: se mi iam trinkos alkoholaĵojn, mi trinkos nur bonajn desertajn vinojn, kies gusto al mi plaĉis.

Nikolaj Petroviĉ kvazaŭ sciis pri miaj sentoj, preninte kun si ĝuste vinon. Kaj mi ne rifuzis festeni.

Ĉio estis perfekta. Ni multe parolis, pridiskutis la problemojn en nia grupo kaj en nia kurso. Ni eĉ tuŝis entute la problemojn de edukado en nia lando. Al mi estis agrable, ke malgraŭ mia aĝo kaj nesperteco Nikolaj Petroviĉ pridiskutas kun mi tiom gravajn demandojn.

Sed en la kapo konstante estis la penso "Kiel li rilatas al mi kiel al virino? Ĉu entute li pensas pri mi?" Lastatempe mi konstante pensis pri li. Mi komprenis, ke mia sento al li plifirmiĝas kaj plifirmiĝas. Kion mi faru? Ial mi hontis eĉ montri al li, kiel mi al li rilatas.

### Sabaton, la 30-an de marto

Pasis ankoraŭ preskaŭ monato. La lecionoj en la

instituto venis al sia fino. Hieraŭ oni anoncis, ke de la 15-a de aprilo komenciĝos la vica ekzamensesio, kaj ni devos plenumi ses ekzamenojn, post kio oni anoncos, ĉu ni sukcesos transiri al la sekva kurso. Vere, min neniam timigis la ekzamenoj. Mi ĉiam studis bone, pri kelkaj studobjektoj, kiujn mi ŝatis, mi sukcesadis eĉ perfekte. Ankaŭ [...]

\*\*\*

Tio estis lasta vorto, ne tuŝita de la fajro. Kompreneble, al mia bedaŭro, mi ne povis ekscii pri la postaj eventoj – kio okazis al la mastro de la taglibro, kiel evoluis la rilatoj inter ŝi kaj la literaturisto Nikolaj Petroviĉ. Ni pensu pri tio, esperante memkompreneble pri la feliĉa fino...

**Korekto**  
En la redaktora enkonduko de la pasinta numero estis eraro en la frazo pri "Eklaboru" (ĝi estis malĝuste nomita "Kunlaboru"). Krome, "Eklaboru" estas ne projekto de TEJO – ĝi estas komerca persona projekto de Chuck Smith kaj aliaj teamanoj. Pli da detaloj – ĉe [www eklaboru.com](http://www eklaboru.com).

## Por ŝatantoj de sudoko

Dmitrij Cibulevskij,  
Ukrainio

**Bonvolu plenigi liberajn ĉelojn per ciferoj de 1 ĝis 9, tiel ke en ĉiu linio, en ĉiu kolumno kaj eĉ en ĉiu el 9 kvadratoj (3 x 3) ne ripetiĝu eĉ unu cifero.**

**Respondoj troviĝas sur p. 14**

6				4	1		3
		3		1	7	6	
	2			8	3	5	9
				2		3	4
	3	8	1				6
7	5	2					
8	6	1	7				3
		7				9	
2			3	4			1

		5	7	6	1	2		
	7			5			6	1
	1	9		4	2		3	7
			4	3			2	
9	2		1		7			
4		8		9		1		3
1	9	2			4	3	8	5
3			5	1			4	
5	4	6		2	8		1	9

# Bonvenigaj ridetoj

## Invito al Vjetnamio – la lando de la 63a IJK



Vjetnamaj fraŭlinoj

KOMPLEZE DE HAI LY LAI THI

Hong Hac, Vjetnamio

**Verŝajne, iuj esperantistoj de la maljuna generacio diros: “Vjetnamio? Tio estas batal-kampo de longdaŭraj militoj... Ĉu veni tien por rigardi la spurojn de l' milito?” Pri la historio ili pravas. Tamen nun, post du jardekoj da renoviĝo, la lando travivas nerezisteblan disvolviĝon. La usona turisma gazeto “Travel Leisure” klasifikis Hanojon la sesa en la listo de 10 plej interesaj lokoj por la hodiaŭaj turistoj. Hanojo estas ankaŭ la urbo de la IJK-63 en 2007.**

Vjetnamio vere dum longa tempo estis batalkampoj de teruraj militoj. Temas pri milito por akiri la sendependecon (1945-1954) kaj ankaŭ por defendi ĝin kaj reunigi la landon (ĝis 1975) – la plej longa milito en la 20-a jarcento. Ne malmultaj homoj el la aĝa esperantistaro iam surstratiĝis por insiste peti pacon al Vjetnamio. Sed jam post jardeko en tiu lando kun vigla vivoforto ne plu troveblis ajna vundo de milito, ajna ruina

vidaĵo. Militspuroj videblas nur ĉe memor-monumentoj kaj sur la medaloj, alpinglitaj al la brusto de la batalintoj. Pliaj dudek jaroj pasis sub la signo de kompleta renoviĝo de la lando. Nun Vjetnamio iĝas pli moderna, pli industriigita, konservante tamen sian nacian identecon.

La homo, kiu vizitos Vjetnamion komence de la 21-a jarcento veturos sur novaj vojoj, sur novaj pontoj, konstruitaj laŭ la plej modernaj teknologioj. Dezertaj teraltaĵoj, montetoj aŭ senhomaj marbordoj nun transformiĝas en pitoreskajn turismajn ripoz-regionojn kun bela tropika pejzaĝo. Tamen, la lando zorge konservas sian historion. La turistoj povas malkovri la antikvan belecon de lignaj domoj de la malnova urbeto Hoi An, aŭ rigardi la Internan Citadelon kun tomboj de la reĝoj el la Nguyen-dinastio en la malnova ĉefurbo Hue. Multaj antikvaj kutimoj estas revigataj speciale por turistoj: noktaj aktivaj, raraj noktaj bazaroj kun ĉestrataj manĝaj-budoj, maljunaj kleruloj side praktikantaj

kaligrafion, hejmeccaj strategoj sub ruĝa lumo de lanternoj.

Multaj ekzotikaj (por la okuloj de eksterlanda gasto) bildoj observeblas ĉiutage: jen knabo sidanta sur la dorso de bubalo kaj lernanta sian lecionon aŭ lanĉanta kajton, jen bazaro de ĵonkoj plenaj je floroj kaj fruktoj sur la Mekong-rivero ĉe la delto Nam Bo, jen “ambazaroj” okazantaj ĉiusabate vespere en Ŝapa, kie gejunuloj el etnaj minoritatoj alvenas por kanti kaj konatiĝi unu kun la alia. Multo alloga estas ankaŭ en Hanojo: vespera prezentado de surakva marioneta trupo; surakvaj bataloj konfuze videblaj pro fumo; bruo de eksplodantaj petardoj, de disŝprucanta akvo; dancoj de la kvar fabelaj bestoj – drako, unukornulo, testudo, fenikso – sub trembrila kaj fantasmagora lumo.

Ĉiu homo vizitanta Vjetnamion ne povas ne admiri la *ao zai-jn* – longajn tradiciajn virinajn robojn, kies baskoj flirtas laŭlonge de la vojoj de la loĝkvartaloj; la strategojn kiuj iam estis la rezidejo de meti-artaj korporacioj de la centra Hanojo; la steleojn, kiuj staras en la Templo de la

Literaturo (la unua universitato de la lando), sur kiuj estas gravurita la nomoj de doktoroj, laŭreatoj de naciaj konkursoj; kaj ankaŭ la belecon de miloj da diversformaj kalkaj insuletoj en la golfo Ha Long, monda here-daĵo agnoskita de UNESKO.

Vjetnamio estas lando kun juna loĝantaro, adoleskantoj kaj junuloj estas pli multnombraj, ol maljunuloj, tial la vivo okazanta ĉe la stratoj kaj vojoj de Vjetnamio estas vere bolanta. Tamen ne nur la vjetnama esperantista junularo ĝojos gastigi vin en la IJK-63. Gastamo kaj amikeco estas karakterizaj trajtoj de ĉiuj vjetnamoj. Ridetoj videblas ĉie. Vjetnamaj ridetoj alvokas vin!



Lago de Redonita Glavo

KOMPLEZE DE HAI LY LAI THI

## La ŝanĝo kiu (ne) gravas

Olúbùnmi Gabriel Ôshó-Davies, Niĝerio

Mi jam aŭdis (kaj vidis), ke se oni perdas unu el siaj antaŭaj dentoj, la perdo povas iom ŝanĝi la vizaĝ-aspekton. Ĉefe kiam la persono ridetas oni rimarkas, ke io jam ne plu estas. Tamen eble ne ĉiuj tuj rimarkas la mankon de la dento kaj la ŝanĝiĝon de la vizaĝo, ĉar la ŝanĝo ĉiam estas nur malgranda.

Tiu ĉi fakto foje estas vera ankaŭ pri skribaĵoj. Vidu unu ekzemplon. Kiam tra la fenestroj de iu malrapide moviĝanta aŭtobuso mi legis unu skribaĵon en la angla lingvo ĉe la en-irejo de iu malgranda vendejo, mi miris, ke tian **varon** oni vendas en tia parto de la urbego. Vere, en la en-irejo de la vendejo oni skribis pri la varo en la nacia lingvo por la nacioj, kaj por la ali-landanoj – en la angla: “MINI HOES”. Mi ne tuj kompre-

nis la sencon de la skribaĵo kaj ne scipovis la nacian lingvon, sed io tuj helpis: tra la tra-vid-ebla **kurteno** mi ekvidis la varojn, kiuj ne estis tio, pri kio parolis la skribaĵo. Ili estis ne **hoes**, sed **shoes** [ŝuz] – ili estis ne **sarkiloj**, sed **ŝuoj**.

Kiam de-falis la unua litero de “shoes” (la angla vorto por “ŝuoj”), la komercisto eble pensis, ke tio ne gravas, ĉar la plimulto de la aĉetantoj ne scipovas la anglan; aŭ, se al li gravis la perdo de la litero, li eble konstante mal-fru-igas la re-nov-

igon. Aŭ li eble simple pensis: nur unu litero mankas.

Do por multaj ali-landanoj, kiuj iras ĉe la vendejo kaj vidas la skribaĵon kaj la varojn, teorie la komercisto jam fariĝis ankaŭ vendanto de sarkiloj, kvankam en vero li restas vendanto de nur ŝuoj.

La ŝanĝo (ne) estas grava, ĉu ne?

**varo** – io vendata, vend-at-ajo  
**kurteno** – granda peco de ŝtofo, kiu pendas sur fenestro  
**sarkilo** – speciala ilo por labori en legom-gardeno



Facila

# Brila juvelo en iom modesta muntaĵo

Paŭlo Mojajev, Ukrainio


**“Arkeo de Noa”, aŭdo-disko kun 20 titoloj, 51 min., tekstolibreto, eld. Kieva Societo “Espero” (Ukrainio), 2006.**

Verŝajne por ĉiuj esperantistoj la internacia karaktero de la lingvo Esperanto estas ekster ĉia dubo. Tiu internacieco kaj enestas en la unua nomo mem de la lingvo, kaj riveliĝas en la internacieco de ĝiaj parolantoj, kaj tute nemalofte okulfrapas en diversaj artaĵoj originale kreitaj en Esperanto. Tamen ĉi-foje temas pri vere unika, vere internaciega kreaĵo. La disko kun la simbola nomo “Arkeo de Noa” prezentas en Esperanta traduko dudek kantojn de dudek popoloj! Centprocenta indico pri la internacieco!

Inter la prezentitaj kantoj estas kaj jam vaste konataj Esperantaj tradukoj (kiel, ekzemple, la slovakaj kanto “Mariŝa”, la pola “Knabineto” aŭ internacie fama italaĵo “Sankta Luĉia”), kaj vere originalaj kaj eĉ ekzotikaj armena, kartvela kaj cigana kantoj. Inter tiuj polusoj troviĝas diversaj, krom du esceptoj (temas pri la usona kanto “Suzanna” kaj pri la kuba “Guantanamera”) eŭrop-devenaj kantoj, ekzemple la germana kanto “Pacvespero”, la angla “Mia Bonni”, la hungara “Hundo”, la rusa “Lipoj malbenitaj” kaj multaj aliaj. La kantoj estas divers-humoraj – estas kaj gajaj, kaj ŝercaj, kaj iom meditaj, sed ili ĉiuj elradias optimismon, humanismon kaj saĝecon, kiuj, kiel facilas certiĝi dank’ al la disko, estas

naturaj por ĉiu popolo.

La prezentado de ĉiuj kantoj estas kelkvoĉa kaj altnivela (nur unufoje aŭdeblas ioma malgataĵo), tamen simpla kaj senartifika. La akompanado, miaopinie, estas iom modesta: preskaŭ ĉiuj kantoj estas akompanataj de sintezilo, kies tembroj sonas foje iom nenature, kvazaŭ produktataj de infana muzik-skatolo; la sola kanto, akompanata gitare, sonas multe pli “popole”. La lingvaĵo estas ĝenerale simpla kaj bona, nur kelkfoje troveblas iom neglataj fraz-konstruoj; en la tekstolibreto mi trovis nur kelkajn negravajn mistaĵojn. Tamen ĉio ĉi neniel povas malbonigi la imponan enhavon de la disko, ĝi estas bonega ilustraĵo por la ideo kaj celo de Esperanto: ĉiuj popoloj estas egalaj kaj ĉiuj meritas estimon kaj admiron.



La disko certe estas brila juvelo, eĉ se en iom modesta muntaĵo. La laboro de la Kieva ensemble “Espero el Ukrainio” certe meritas laŭdojn. Mi sincere esperas, ke la disko ĝuos intereson de la Esperanta popolo, ĝi certe meritas tion.

La diskon distribuas s-ro M. Lineckij. Kontaktu lin por mendi la diskon: <ml@espero.kiev.ua>, poŝte: p.k. 91, Kievo-201, UA-04201, Ukrainio. La prezo (sen sendokostoj) estas 10 eŭroj.



Christian Lavarenne, Francio

Mi volus bumerangi pri la alia, pli frua Ekotopia, kiu ankaŭ estis Esperanta. En la jaro 1990 ĝi okazis en Hungario. Antaŭ ĝi EYFA (la ĉefa organizaĵo, kiu planas la aranĝon) organizis biciklan karavanon el Bergen (Norvegio). En la sama jaro BEMI planis biciklan karavanon al Litovio, sed devis rezigni pro la interveno de rusiaj tankoj en Vilno. Do kvar BEMI-anoj decidis anstataŭe partopreni la karavanon de EYFA al Ekotopia. Unu franco kaj unu danino startis de la pleja komenco kaj ni (unu norvegino kaj alia franco) aliĝis al la karavano en Nurenbergo. Krom ni estis ankaŭ rusa biciklanto, kiu tute neatendite scipovis Esperanton.

Do kiam ni ekbiciklis, esperantistoj formis preskaŭ 10% de la karavano! Ĉiutage okazis kunveno por decidoj pri la sekva tago kun tradukoj en kvin lingvojn: la anglan,

## Jam alia esperantiĝinta Ekotopia

germanan, francan, rusan kaj ĉeĥan. Ĉiuj vidis, ke ni kvin, el kvar landoj, senprobleme babilas, kaj ni kunportis kvarlingvajn flugfoliojn pri Esperanto kaj ekologio, sufiĉe trafajn. Post nur kelkaj tagoj ni povis proponi spontaneajn E-kursojn en kvar lingvoj: la angla, germana, franca kaj rusa. Dudeko da kurbiciklantoj eklernetis (preskaŭ la triono de la tuta karavano).

Kiam ni atingis la landlimon inter Germanio kaj Aŭstrio, okazis problemo pri du rusoj, kiuj eble ne havis vizojn por trapasi tiun landon. La atendo daŭris, kelkaj komencis enui kaj malpacienti. Subite iu proponis kapti la okazon por E-leciono en ombro de arboj: sesdeko da partoprenantoj (fakte, ĉiuj krom tiuj, kiuj helpis solvi la problemon)!

Kiam ni finfine alvenis 140-ope al Ekotopia, ni trovis tie nederlandanon, kiu ĵus lernis Esperanton, sed ĝis tiam ankoraŭ ne havis la okazon paroli ĝin, kaj rusinon, kiu kantis en Esperanto akompanante sin per gitaro. Sed la plej stranga afero estis, ke hindo, invitita eble por instrui jogon, faris en la angla paroladeton pri la lingva problemo kaj pledis kontraŭ la angla, i.a. jene: “Vi skribas *bo u to*, vi prononcas “bat”, vi skribas *co u to*, vi prononcas “kat”, sed vi skribas *po u to* kaj vi prononcas... “put” – ne, tiu ĉi lingvo ne taŭgas...” Kaj li eĉ finis parolante pri Esperanto (kiun li fakte ne lernis).

Ni kaptis la okazon, ke la programo komenciĝis nur sekvatage, por proponi kun konsento de la organizantoj E-lecionon, al kiu venis pli ol 200 alvenintoj! La saman posttagmezon, kiam la organizantoj ne sciis, kiel nomi la grandajn tendojn ĵus starigitajn, iu proponis, ke ni donu Esperantajn nomojn! Bedaŭrinde, ni ne povis resti dum tri semajnoj, tamen ni aranĝis, ke la angla BEMI-ano loĝanta en Budapeŝto venu kun E-materialoj por daŭrigi la kurson.

Bedaŭrindas ankaŭ tio, ke post tiu jaro esperantistoj ne partoprenis tiel amase la EYFA-bicikladojn al Ekotopia. Estus do ege bone, se pluraj biciklademaj esperantistoj denove partoprenus, kaj ke eble la biciklado al Portugalio survoje vizitus la iaman organizinton de la jam mita 20 mil-kilometra *Biciklado tra Eŭropo kontraŭ la lingvaj baroj* (1987) Jorgos Comte, nun loĝanta inter Castelnau kaj Mirepoix, kaj min en Saint-Girons (Ariège). Ni ambaŭ estas en la *Pasporta Servo*.

La plurpaĝa artikolo pri la unua biciklado aperis en la monata gazeto de la departementa asocio de verduloj “*Verts 17 Ecologie*” (numero 16, marto-aprilo 1991, La Rochelle, Francio).

# Rat-Man: mitoj kaj veroj pri la musa itala super-antiheroo

Daniele Binaghi, *Italia*

Rat-Man, la musa itala superheroo, kiu fakte ja estas mito por multaj (inter ili, ankaŭ mi), renkontis dum sia "kariero" multajn mitojn, kutime el la komiksa mondo; fakte, ĝi vere naskiĝis kiel parodio, kaj ĝiaj unuaj historioj rakontis ĝuste tiujn renkontiĝojn: la aŭtoro, Leonardo Ortolani, estis kaj ankoraŭ estas arda subtenanto de la komiksoj de tiu periodo,

precipe de la bildstrioj desegnitaj fare de Jack Kirby.

Jen do kelkaj bildstrioj, en kiuj Rat-Man videblas flanke de tiaj famuloj, kiel *Spider-Man* (la Homo-Araneo), *Doctor Doom* (la Doktoro Destino), kaj Reed Richards kaj Susan Storm, el la grupo *Fantastic Four* (Eksterordinaraj Kvar); en la lasta, Rat-Man mem flugas tra la steloj kiel *Silver Surfer* (la Arĝenta Glitabulisto).

Ĝuu ilin!

Kaj jen lastmomenta neoficiala novaĵo: la itala televida kanalo RAI2 jam dissendis 14 epizodojn de la televida serio de Rat-Man (kelkaj troveblas en retejoj kiel *UTube*), kaj oni antaŭvidas eldonon de DVD-oj; mi proponis al la eldonistoj aldoni esperantlingvajn subtitojn, kaj ili respondis, ke tiu ebleco ekzistas... Pli da informoj kaj aktualigojn vi trovos en la paĝoj de la Projekto RoMEo (<http://www.pecorElettriche.it/esperanto/RoMEo/>).

© Leo Ortolani, 2007  
Trad. en Esperanton de Daniele Binaghi




## Anonce

41-jaraĝa esperantisto el Kongo serĉas korespondamikojn en diversaj landoj de la mondo. Roger Mambuene Mbunga, P. B 29, Av. Shaba, n. 8, Mbanza-Ngungu, Bas-Congo, D.R. Kongo. Retadreso: rogermambuene@yahoo.fr. Tel: 00243 81-2020-685.

La fama lingvosciencia eldonejo BUSKE-Verlag en Hamburgo, Germanio, en aprilo 2007 aperigos Grandan Vortaron Germanan-Esperantan kompilitan fare de Prof. Erich-Dieter Krause, membro de Akademio de Esperanto. La vortaro ampleksos pli ol 160 mil serĉvortojn kaj parolturnojn sur 1679 paĝoj grandformataj. Ĝi do estos la (ĝis nun) plej ampleksa Esperanto-vortaro en la mondo. Informiĝu ĉe [www.buske.de](http://www.buske.de) aŭ [info@buske.de](mailto:info@buske.de) (germanlingve).

Ĉu vi scias, ke la ĉijara UK okazos en Japanio? La kongresurbo Jokohamo estas bela havena urbo, kiu situas ĉ. 50 km suden de Tokio. La kongreso daŭros de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto. Ni elkore atendas viajn partoprenojn en ĝi, eĉ post la IJK en Hanojo!

Kiel kutime, kompreneble, okazos junulara programo dum la UK: muziko, koncertoj de la litova grupo Asorti, okinava muziko, aliaj Esperantaj kantoj kaj diskoteko nokte (filmejo kaj gufujo samtempe). Vi povas konatiĝi kun japanaj kulturoj per amuzaj ludoj, dancoj kaj gustumadoj. Atendas vin ankaŭ malmultekostaj intereseĝaj ekskursoj (eĉ nokta!). Informiĝu! <http://www.k2.dion.ne.jp/~dsn/uk/index.html>; respondeculo\_ junularaprogramo@yahooogroups.jp



Respondoj al la enigmo sur p. 11

6	7	9	2	5	4	1	8	3
5	8	3	9	1	7	6	4	2
1	2	4	6	8	3	5	9	7
9	1	6	8	2	5	3	7	4
4	3	8	1	7	9	2	5	6
7	5	2	4	3	6	8	1	9
8	6	1	7	9	2	4	3	5
3	4	7	5	6	1	9	2	8
2	9	5	3	4	8	7	6	1

8	3	5	7	6	1	2	9	4
2	7	4	9	5	3	8	6	1
6	1	9	8	4	2	5	3	7
7	5	1	4	3	6	9	2	8
9	2	3	1	8	7	4	5	6
4	6	8	2	9	5	1	7	3
1	9	2	6	7	4	3	8	5
3	8	7	5	1	9	6	4	2
5	4	6	3	2	8	7	1	9

## Magia altiro

Anguleto

Aneta Ubik, Germanio

Laceco. Mi estas laca. La okuloj estas pezaj, la kapo zumas. La kapo lulbaskulas, la lito magie altiras la korpon. Kio okazas, se mi simple malŝaltas la racian pensadon? Mi instinkte moviĝas kaj faligas min en la liton, anĝele ridetante, sentante la korpan plipeziĝon, observante la trapasantajn pensojn. Observante iliajn malaperojn, observante la malaperon, la sento-kapablo malaperas, nur ioma konscio restas; restas nur: Mi estas.

Karaj legantoj!

Per tiu ĉi rakonteto ni starigas novan rubrikon – "Anguleto". En tiu ĉi rubriko ni aperigos simplajn, pensigajn, foje amuzajn etajn tekstojn. Kaj ni kore invitas desegnemulojn – se vi volus fariĝi ilustranto de tiu ĉi rubriko (en kiu ajn stilo kaj maniero), bv. skribi al la redakcio – kontakto@tejo.org.

### Gratule



La 30-an de septembro 2006 en la familio de Tahmina kaj Saidnabi Saidilhomzoda naskiĝis filineto Marjam, kaj la 19-an de decembro 2006 naskiĝis en la familio de Olga Ĥromova (iama Gribovan) kaj Vladimir Ĥromov naskiĝis filineto Anastasija. Gratulojn al la feliĉaj gepatroj, kaj bonvenon en la mondon – kaj Esperantujon – al etaj Marjam kaj Anastasija!

## Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu 2 internaciajn respondukuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio**

### JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje jare (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriroj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

*modela stilo kaj facila lingvaĵo* (1500 vortradikoj sen glosoj), *enhavo tre varia*: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <[www.junaamiko.inf.hu](http://www.junaamiko.inf.hu)> aŭ en <[www.lernu.net](http://www.lernu.net)>!

## Kotiztabelo de UEA por 2007

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	15	38	95	57	34	190
Aŭstrio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Belgio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Brazilo/eŭro	5	12	29	17	10	58
Britio/pundo	6	16	39	24	15	78
Ĉeĥio/krono	200	490	1220	770	460	2440
Danio/krono	70	170	425	270	160	850
Estonio/eŭro	5	12	31	20	12	62
Finnlando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Francio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Germanio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Greklando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Hispanio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Hungario/forinto	1700	4300	10750	6850	4100	21500
Irlando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Islando/eŭro	9	23	57	34	20	114
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Japanio/eno	1400	3400	8500	5100	3000	17000
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Malto/eŭro	6	16	39	24	15	78
Nederlando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dolaro	18	45	112	67	40	224
Pollando/zloto	20	50	122	76	46	244
Portugaliao/eŭro	9	23	57	36	22	114
Rusio/eŭro	5	12	29	17	10	58
Slovakio/krono	230	570	1425	910	550	2850
Svedio/krono	80	210	530	340	200	1060
Svislando/franko	14	36	90	54	32	180
Usono/dolaro	11	27	67	40	24	134

TARIFO A/eŭro	6	16	39	23	14	78
TARIFO B/eŭro	5	12	29	17	10	58

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Kipro kaj Slovenio laŭ Malto; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando; Bulgario, Latvio, Litovio kaj Rumanio laŭ Estonio.

TARIFO A: Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MALLONGIGOJ:

**MG** – Membro kun Gvidlibro

**MJ** – Membro kun Jarlibro

**MJ-T** – MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

**MA** – Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*)

**MA-T** – MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

**SA** – Simpla abono de revuo *Esperanto* sen membreco

**Kto** – Simpla abono de revuo *KONTAKTO*

**SZ** – Societo Zamenhof (subtena kotizo aldone al membreco)

**PT** – Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas *KONTAKTO* kaj *TEJO Tutmonde*)

**DM** – Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)

**DMJ** – Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oble de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)

**Kiel individuaj membroj de TEJO** (MJ-T aŭ MA-T) por 2006 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1an de januaro 2006 (t. e. kiuj naskiĝis en 1976 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.

**Eblas aboni** ankaŭ al *TEJO tutmonde* sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la koncerna lando.

**Oni povas pagi** pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per ĝiro al ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.

### FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

#### fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas:

– revuon *KONTAKTO*

– bultenon *TEJO Tutmonde* (oficiala organo de TEJO)

– akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso

– aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

# La festoj en Benino



KOMPLEZE DE FRANÇOIS HOUNSOUNOU

*François Hounsounou, Benino*

La loĝantoj de la vilaĝo Aguidahoué organizis la tradician feston por renkonti la Novan Jaron 2007. Matene la infanoj kaj la plen-kresk-uloj kantis, dancis kaj iradis tra la vilaĝo de domo al domo por esprimi sian ĝojon. Tag-meze en multaj familioj ĉiuj familianoj renkontiĝis ĉe la famili-estro por kune manĝi kaj trinki, kio ne estas kutima en la aliaj tagoj pro la afrikaj tradicioj. Ĉiuj manĝis per la manoj.

Post-tag-meze eksonis la tradiciaj **tamtamoj**, kaj la homoj ekdancis. Por multaj dancoj estas necesa la granda forto, tial la ge-mal-jun-uloj ne tre volis danci. Ili trankvile sidis ĉe la tablo mal-antaŭ la dancantoj kaj kuraĝ-igis la

junulojn. La homoj estis vestitaj per la tradicia vesto, nomata *bohoub*, kiun oni povas vidi sur la fotoj.

Je la dekseca horo post-tag-meze okazis la pied-pilka ludo, aranĝita inter la vilaĝanoj kaj eks-vilaĝanoj, kiuj nun loĝas en la urbo. La vilaĝanoj venkis kaj ricevis la premion. La vilaĝanoj ludis en la ruĝaj ĉemiz-etoj, kiuj estis donacitaj de unu el la politikistoj; la junuloj, kiuj loĝas urbe, havis blublanĉajn ĉemiz-etojn. La vilaĝanoj uzis la feston ankaŭ por solvi kelkajn problemojn kaj mal-paciĝojn kun la gejunuloj.

Krom la nov-jar-festo en Benino ĉiu-jare la 1-an de **aŭgusto** okazas la festo de **sen-depend-eco**. La vilaĝanoj kun-labore kun la urb-estro organizas la



KOMPLEZE DE FRANÇOIS HOUNSOUNOU

pied-pilkajn ludojn inter la vilaĝanoj. Alia grava festo estas la festo de **vuduo**, kiu ĉiu-jare okazas la 10-an de **januaro**. Ĝi estas tre interesa por la subten-antoj de vuduo en Benino. La ĉefaj aktiv-aĵoj de tiu festo okazas en Ouidah, kiu estas la fama turisma loko pri vuduo kaj **sklaveco**.

En la sama vilaĝo la lingvo Esperanto estas akceptita por instru-ado en la baz-lern-ejo. Sed pro la manko de la instru-isto, kiu povus sen-page gvidi la kurson, la Esperanto-

movado tie **stumblis**, sed ne mortis. La gepatroj kaj la lern-ej-estro volus re-aktiv-igi la tiean Esperanto-movadon.

- tamtamo** – bat-muzik-ilo
- aŭgusto** – la lasta monato de somero
- dependi** (de iu) – ne esti plene libera; obei iun
- sendependeco** – plena libereco de la lando
- vuduo** – tradicia religio en Afriko
- januaro** – la dua monato de vintro
- sklavo** – la homo, kiu tute ne havas personan liberecon kaj povas fari nur tion, kion permesas lia mastro
- stumpli** – preskaŭ fali pro mis-paŝo



KOMPLEZE DE FRANÇOIS HOUNSOUNOU

